Ŝi daŭrigis sian kantadon de la melodio dum ŝi surmetis sian ĉapelon. Kiam ŝi venis al la paŭzo kie la tenoro devus ekkomenci, granda estis ŝia surprizo aŭdi Arturon mallaŭte kanti la muzikon. Ŝi sin turnis al li, ridetante, kaj kantis la sopranan muzikon. Arturo ankaŭ ridetis kiam ili finis ĉi tiun grandan dueton.

“Do vi ja scias muzikon,” diris Selma, evidente ĝojigita de la eltrovo.

“Nur sufiĉe por ami ĝin,” estis la pli modesta ol vera respondo, ĉar Arturo estis laŭnature muzika, kaj lernis multon pri la arto.

Ili ambaŭ diris “Bonan nokton” al la malsanulino, kaj Arturo akompanis la junulinon ĝis ŝia hejmo. Li parolis pri la nemultaj operoj kiujn li aŭdis kaj la multaj kiujn li deziras aŭdi, kaj Selma promesis kanti al li ĉiujn siajn plej bone konatajn ariojn. Ŝi eltrovis, ankaŭ, ke li scias la germanan lingvon, kaj facile komprenis ĉiun vorton de “Ich liebe dich.”

Ĉio tio ĉi dum ilia mallonga promeno kune. Ofte ili renkontiĝis poste—plej ofte ĉe la hejmo de sia komuna amikino, la malsanulino; sed iafoje, ankaŭ, ĉe la hejmo de Selma. Tie, kun ŝia piano kaj ĉiuj ŝiaj libroj, ili ĝuis ravajn horojn de muziko. Harmonio mem ŝajnis kuntiri ilin. Ŝi kantis al li kaj instruis siajn plej bone ŝatatajn kantojn, kaj pritraktis la diversajn operojn kiujn ŝi sciis. El ili “Hamleto” estis ŝia favorato. “Tiu estas ravanta muziko,” ŝi impulse ekkriis unu tagon, kiam ili esploris la partituron. “La opero diferencas de la teatraĵo, vi devas scii; ĝi havas en si la morton de Ofelio—la malĝojan scenon—la plej belan priskriban muzikon kiun oni iam aŭdis, aŭ (Daŭrigata sur paĝo 102)

VORTOJ de ZAMENHOF **Ho Mia Kor'** MUZIKO de H.I. KEYES

Andante(nerapide) *mf(nelaŭte)*

Andante(nerapide) *mf(nelaŭte)*

Ho mia kor', ne

ba tu mal-trank-vile; El mia brusto nun ne sal-tu for!

Jam te-ni min ne povas mi fa-ci-le, Ho - - - - -

mi-a kor'!

Ho mia kor', post longa la-bo-ra-do, Ĉu mi ne venkos en deci-da hor'?

Su-fi-ĉe; trankvil - iĝ - u del' ba-ta - do! Ho

laŭte mi - a kor'!

triumfe mi - a kor'!

triumfe

The musical score consists of two systems. The first system has a vocal line and a piano accompaniment. The vocal line starts with the lyrics 'Su-fi-ĉe; trankvil - iĝ - u del' ba-ta - do! Ho' and ends with a long note. The piano accompaniment features a rhythmic pattern of eighth and sixteenth notes. The second system continues the vocal line with 'mi - a kor'!' and 'mi - a kor'!' and includes dynamic markings 'laŭte' and 'triumfe'. The piano accompaniment continues with similar rhythmic patterns and includes a 'triumfe' marking.

Ho Mia Kor' - 2



He Told the Truth

A man and his wife, with five children, tried to find an apartment in the city, and met everywhere with the same obstacle—the landlords objected to such a large family. The couple were at their wits' end. Then the father said:

"Wife, tomorrow you take the three little ones to the cemetery, to visit your mother's grave, and I will take the other two and look for an apartment."

He found a place that suited him, and then was confronted with the question, "How many children have you?"

Before answering he heaved a deep sigh. Then pointing to the two youngsters, he said: "Five, but three are with their dear mother in the cemetery."

He got the apartment.

Li Diris la Veron

Viro kaj lia edzino, kun kvin infanoj, provis trovi loĝejon en la urbo, kaj ĉie renkontis la saman barilon—la dom-mastroj malkonsentis al tia granda familio. La paro ne plu sciis kion fari. Tiam la patro diris:

"Edzino, morgaŭ vi konduku la tri etulojn al la tombejo, por viziti la tombon de via patrino, kaj mi prenos la aliajn du, por serĉi loĝejon.

Li trovis lokon kiu plaĉis al li, kaj tiam oni faris al li la demandon, "Kiom da infanoj vi havas?"

Antaŭ ol respondi, li ellasis longan ĝemon. Tiam, montrante al la du junuloj, li diris, "Kvin, sed tri estas kun sia patrino en la tombejo."

Li akiris la loĝejon.

(Daŭrigo de paĝo 99)

povas imagi. Ĝi estas plena de la kapricoj de freneza menso, intermiksitaj ĝojo kaj malĝojo; la plej malĝoja parto de la sceno estas tiu en kiu ŝi penis ŝajnigi gajecon, ĉar la tuta muziko estas nuanco de ĉiama doloro.

Por klarigi, Selma kviete ludis la orkestran partion kaj dolĉe kantis la melodion. Arturo foliumis la muzikon por ŝi, kaj ili kune interpretis la scenon. Tio estis agrabla tasko. Selma zumis, kantis kaj ludis, aŭ eble legis laŭte la vortojn, dum Arturo, starante ĉe ŝia flanko, kantis fragmentojn, aŭ fajfis frazon, aŭ batis la takton laŭvole.

Pli ofte, kiam, ŝi ne sciis, li rigardis al ŝi anstataŭ al la partituro. Li sopiris tuŝi ŝiajn ondajn harojn aŭ la kurbon de ŝia beleta orelo. Diversfoje li sin klinis tre proksime al ŝi—kvazaŭ por vidi la malgrandan presitaĵon de la muziko. Nek "freneza" nek "malĝoja," sed nur ĝoja, ŝajnis la muziko tiun tagon al li.

Frazojn kies vortojn Selma sciis parkere, ŝi kantis starante kaj interpretante sian kantadon per mallongaj klarigoj kiel ŝia imago diktis.

"Ofelio penas kanti malnovan baladon; sed la kompatinda junulino apenaŭ komencis antaŭ ol ŝi tute forgesis pri ĝi, kaj ekridgegis en sovaĝan, sonoranan ekridon, kaj poste esploris pasiajn plorĝemojn. Ĉio estas rakontita per la nobla arto de muziko, vi scias, kun perfekta ritmo kaj harmonio."

Selma tiam kantis tiun mirindan serion da stakataj ridoj en la freneza sceno de la opero, kun ĝia brila alta noto de la ĝemanta, melodia plorkrio.

"Mi povus plori dum mi kantas ĝin; la muziko malkaŝas tiom. Ĝi estas malĝojo sen espero kaj ĝojo sen memoro alternante en la menso de la malgaja Ofelio," diris Selma.

Arturo restis silenta dum momento, kaj tiam li diris mediteme:

"Ŝajnas al mi, kvazaŭ la muziko ne konformas al la teatraĵo. Se Ofelio kantis tiamaniere, ĉu vi ne scias la neeviteblan rezulton?"

Li ekprenis la manon de Selma, kaj sidis rigardante ameme en ŝiajn okulojn.

"Se ŝi estus kantinta tiamaniere, mi diras, Hamleto nepre estus devinta ami ŝin kaj esti fidela al ŝi malgraŭ la fantomo de sia patro!"

POR VIA KLASO:

Lando de Arĝenta Akvo, Rakonto
el la Okcidento de Usono.

Tradukita de Edward S. Payson.

Prezo, 25 cendoj.

Speciala prezo por klasoj.



Are You One of Them?

*Extract From a Letter of
Dr. L. L. Zamenhof*

Your letter is signed: "One of the warmest friends of the language Esperanto"! I do, in fact, remember that from time to time you send me letters asking after the progress of the affair; but you have never written to say what you yourself are doing for our cause. The "warm friend of our affair" is not he who is always asking questions, but he who works for it and spreads it. Instead of asking me every month what has been done, you should ask yourself, "What have I done for our affair during the past month?"

? ? ? ? ?

What have you done? Have you renewed your subscription to *Amerika Esperantisto*, the ONLY magazine which brings you all the worthwhile Esperanto news in English (for your non-Esperanto friends) and in Esperanto for YOU?

Have you renewed your membership? It is your membership that helps to carry the load of our financial burden.

If not—then DO IT NOW!

MEMBERSHIP AND SUBSCRIPTION,
\$2.00.

Kiam Kaj Se

De H. I. KEYES

(Melodio—"Flow Gently, Sweet Afton")

Ho, kiam riĉeco alvenos al mi

Bonegan uzadon mi faros el ĝi:

Mi prenos da mono spesmilon aŭ du

Por helpi la mondon, kaj—kaj tiel plu!

Du spesojn por orfoj? Donacos ĝin mi—

Ĉu du ne sufiĉos? Donacos mi tri!

Mizero? Per speso forigos mi ĝin—

Ho, malavarulo mi ja pruvos min!

Se reĝa potenco enestus en mi

Ho, kian bonaĵon mi farus el ĝi!

Se malriĉa homo al mi montrus sin,

Mi lin bastonadus kaj forsendus lin;

Mi ofte promenus publike por ke,


Aŭdinte petantojn, mi diru: "Ne! ne!"

Se iu petegus kompaton ĉe mi,

mi tuje detranĉus la kapon al li!

—From the coming "American Esperanto Song Book."

Esperanto and Radio



Prof. Jens Schjerve is broadcasting from Brooklyn, and he is using the above-mentioned text-book, which proves to be well adapted to such use.

Esperanto lectures and lessons are also being broadcasted from Long Beach, Cal., and Seattle, Washington.

E. A. N. A. is willing to extend an offer similar to the one made to the Esperanto Club "Harmo-

Esperanto lessons and talks have been broadcasted for a number of years from the radio station WBBC and WCGU in Brooklyn, N. Y. These broadcasts always took place at 3:00 p. m. at a frequency of 1400 kilocycles, and were arranged by the Esperanto Club "Harmonio" of New York. It was found, however, that these broadcasts could be made much more effective and profitable to the Esperanto organization sponsoring the broadcast if that organization would offer free textbooks to those who request them through the radio station. The Esperanto Association of North America offered to supply a free copy of "Esperanto Course for Beginners" to the first 1000 radio listeners requesting them. In this way the new adepts are brought in closer contact with the movement, and we have their names and addresses for future use. At the same time, they indicate to the radio station that there is considerable interest in the course, and tends toward a greater respect for the matter. At the present time

nio," in regard to furnishing text-books for radio Esperanto-lessons, to any other Chapter of E. A. N. A. which feels the need of closer contact between the radio audience and the Esperanto-broadcasting organization. Write to the Central Office for conditions, giving details of your broadcasts.

The Bulletin Board

We regret to report that Armin Doneis, treasurer of EANA, is forced to leave the Central Office, due to unforeseen difficulties. Mr. Doneis has been a member of the office staff at Fort Lee for the past eight months and spent much time tending to the correspondence, book sales, proof-reading, etc., and assumed responsibility at the Central Office whenever the General Secretary was away on any of his frequent business trips. We are sorry to see him leave us, as his work aided much in the smooth operating of the Central Office. He is returning to his former home in Milwaukee.

During his stay in the New York Metropolitan area, Mr. Doneis studied the Cseh-method of Esperanto instruction under Prof. Schjerve, and is now qualified to conduct Cseh-courses in Esperanto as he has become a certified teacher of the International Cseh-Institute of Esperanto, and has also the EANA teacher's certificate. He will no doubt be requested to conduct Cseh-courses in the Middlewest soon.

The North American Esperanto Almanac, 1932. Owing to the fact that some new features, which we intend to incorporate in the new Almanac, have developed slower than we anticipated, this year's Almanac will be out later in the Spring. Business registration is still accepted and those who wish to renew their membership, or new clubs, who wish to be entered, can still do so.

Eana's Stamps, 1932. We had it all planned—the new stamps for 1932—and along comes our treasurer and suggests that we let everybody in on this planning. So here it goes:

If you send in a sketch or have an idea for a good stamp, send it to the Central Office before May 1st. Judges will be the Publication Committee.

For the sketch which will be accepted we offer **THREE DOLLARS IN BOOKS** selected from our Book List. Get busy and send us your idea.

Closing Date for the May-June number of A. E. is **POSITIVELY** April 30th. Get your reports in early.

New Books : Novaj Libroj

La Lingvo de la Bestoj, prelego farita de Florence Barker, B. A., dum kunsido de la "Amikoj de la Bestoj," ĉe la 22a Universala Kongreso de Esperanto. 23 paĝa libreto, prezo 3 pencoj, eldonita de la Nacia Konsilantaro pri Bonstato de Bestoj, 36 Gordon Square, Londono, W. C. 1.—En tiu ĉi verketo la verkistino elvokas kompaton por la malbone traktataj bestoj kiuj mute kaj senproteste servas al la homaro, kaj ŝi pledas por pli indulga traktado de niaj bestaj kunuloj. En la libreto troviĝas preĝo kiun la bestoj verŝajne farus al la homoj se ili povus paroli; ankaŭ troviĝas Ĉarto de la bestorajtoj kiujn la homoj devus respekti. La Libreto estas bone presita kun bona lingva stilo, tamen, ŝajnas ke estas sufiĉe da mizero inter niaj homaj proksimumoj kiun ni devus forigi per bonkonduco, antaŭ ol doni leĝajn rajtojn al la bestoj. A. F. D.

Printempo en la Aŭtuno, de Julio Baghy. Originala romano, 114 paĝoj; eldonis Heroldo de Esperanto. Prezo ne indikita. Jen libro en kiu Baghy montras la animstatojn kaj pensmanierojn en la Printempo kaj Aŭtuno de la homa vivo. La rakonto temas pri renkonto inter du trovitaj infanoj kiuj enamiĝas reciproke kaj . . . sed vi legu prefere la libron mem. Pri la boneco de lingvo kaj stilo certigas la fakto ke ĝi estis verkita de la majstro Baghy. Bona preso kaj bona papero. A. F. D.

La Himno, de M. Ljubin. Novelaro eldonita de EKRELO en Leipzig, Germ. Jen estas libreto kun 36 paĝoj, prezo 0.35 marko germana, konsistas el kolekto da mallongaj rakontoj kaj interesaj skizoj pri la proletaro kaj ĝiaj doloroj kaj problemoj. Bona lingvo, bona preso. A. F. D.

Socialismo, de Aleksandro Bezimenskij. Poemo elrusigita de N. V. Nekrasov, eldonita de EKRELO de Leipzig; 39 paĝa libreto kun ampleksa komentario. Prezo 0.40 germana marko. La poemo traktas la diversajn fazojn de Socialismo kaj ĝia progreso kaj kun brila klareco elmontras la grandiozan epokfarantan socialisman konstruadon, kiu estas realigata hodiaŭ en Sovet-Unio. La libreto estas plaĉe presita sur bona papero. A. F. D.

5,000,000, S. Grenkamp-Kornfeld. Eldonejo "Esperantista Voĉo," Jaslo, Pollando. 115 pp. Prezo 3 fr. sv. Kolekto de mallongaj skizoj kaj rakontoj. Post iom sinika enkonduko, la verkisto montras usonan milionulon, Sron. Dolarer kaj la metodon per kiu oni ĉantaĝis lin. La verkisto donas spritajn batojn al esperantistoj kaj neesperantistoj plenmane. En unu vorto la libro estas ĝaza.

B. E. S.-a Adresaro de Esperantistoj de Ĉiuj Landoj. 9a eldono, 1931. Bohema Esperanto-Servo, Potštejn, Ĉekoslovakio. 100 pp. 1 fr. sv. (20 cendoj). Enhavas adresojn de 1256 en ĉiuj partoj de la mondo (preskaŭ ĉiuj en Eŭropo) kiuj deziras korespondi kaj la temoj pri kiuj ili interesas. Ĉiu korespondema esperantisto devus obteni la libron kaj anonci siajn dezirojn por la venonta adresaro. Per sistemo de mallongigoj, oni povas esprimi en du linioj siajn interesojn. Certe tre malkara kaj efika helpo.

CHARLES H. BRIGGS.

Kristanismo kaj Patriotism, L. N. Tolstoj. Tradukis I. Maĉernis. Sennacieca Asocio Tutmonda, Eldona Fakto Kooperativa, Leipzig. 111 pp. 1.20 markoj germanaj. Libreto skribita en 1893 okaze de la vizito de la rusa eskadro al Tullono, Francujo. La verkisto kontraubatalas la ideon "patriotisma" kiam tio egalas malamikecon al aliaj landoj. Patriotismo en tiu senco povas havi signifon en landoj kie aŭtokratoj regas sed ne havas saman signifon kie la popolo mem havis kaj havas relative grandan voĉon en la kontrolo de sia regado. Publika opinio, laŭ la aŭtoro, devus malpermesi ĉiujn militojn. La konscienco devas regi sole. La libro enhavas nur incidentajn referatojn al organizita Kristanismo kaj al Krist-simila konduto. Ĝi estas furioza, potenca kaj grava atako kontraŭ la organizado de publika opinio por preparado al militado kiel instigita de registaroj kaj antaŭenpuŝita de gvidantaro kontraŭ la profito de la homaro. Ĝi havas mesaĝon eĉ hodiaŭ kaj eĉ en demokrataj landoj. Esperinde ĉiu militemulo kaj ĉiu pacemulo legos kaj pripensos ĝin.

CHARLES H. BRIGGS.

PATRINO ANSERINO

Verkis ses-jara Winnifred Sackville Stoner.

This is "Mother Goose" in Esperanto and is specially recommended for Children's classes. Price, 15c.



Prokrasto estas la plej bona rimedo kontraŭ kolero.—*Seneca*.

Nur estas unu paŝo de la majesta al la ridinda.—*Napoleon*.

Libereco ne estas la rajto de unu sed de multaj.—*Herbert Spencer*.

Esperanto and Travel

Thomas Cook and Son, who conduct one of the world's most completely organized travel bureaus, with branches in every important city



Madeleine, Paris

around the globe, have recognized the practical value of Esperanto. And in doing so, they have made it possible for American Esperantists to do a great service both to the Esperanto Association of North America and to the movement in general.

Under the auspices of The American Institute of Educational Travel, Cook and Son are advertising and will conduct an Esperanto tour to Europe this summer, including the Esperanto World Congress at Paris, in the itinerary of the tour. They are making an especially attractive offer to non-Esperantists travelers. All those who make reservations for this tour who do not know Esperanto will be taught before and during the tour, without cost, and given the best possible demonstration while in Europe of the great value Esperanto gives to every traveler. Four weeks will be spent in England and on the Continent visiting with Esperantist groups and sightseeing under unique and most pleasant arrangements.

Every friend of Esperanto in North America whose address is listed in the 1931 E. A. N. A. Yearbook has received full details of this tour. That which should be emphasized here is that this tour is not projected by Cooks with an expectation of exploiting the Esperanto movement. They are anxious to help build a greater Esperanto movement if they can secure the co-operation of Esperantists in developing this attractive feature.

Naturally a great business enterprise like Cook

and Son is not so interested in the idealistic phase of our movement, but the fact that they recognize the growing importance of Esperanto enough to add these Esperanto tours to their many featured tours is a great compliment to our "kara lingvo."

All those friends of the movement who are wide awake and anxious to advance the cause of International Language will do everything possible to make this first Esperanto Tour a great success in order that this premier travel organization will continue and extend this feature in the years to come. Every traveler on one of these tours will come back a very warm friend and booster of Esperanto.

Now the way in which all friends of Esperanto can help E. A. N. A. and the movement is by making every effort to find those in their various cities and communities who would likely travel to Europe this summer and either sell them this tour or secure their address and send to The American Institute of Educational Travel, 587 Fifth Avenue, New York, stating in their letter that such person or persons are interested in the Esperanto Tour. And if any one who is already an Esperantist can take the tour, by all means do so.

Help E. A. N. A. in a big way and make new Esperantists of the finest type.

Never before has such an elaborately prepared Esperanto tour been offered the general traveling



The Famous Palais de Justice at Brussels

public, which is under the direction of James D. Sayers, one of America's pioneers and teachers of Esperanto.

Nia Mondvoĵaganto Revenas

*Kiel Speciala Delegito de I. C. K. kaj Eksterordinara
Reprezentanto de E. A. N. A. li Paroladis
en 41 Landoj kaj Insuloj*

“Alvenos Lunde, Scherer” estis la lakona radiogramo, kiu atingis la Centran Oficejon de EANA, sendita de sur la Bremen naĝanta inter Eŭropo kaj Usono.

Je la 1a de Februaro iris al la doko la samideanoj Maury, Pres. de Ĉapitro 2 kaj nia kasisto Doneis, kiel oficiala reprezentanto de la Centra Oficejo, por saluti la specialan delegiton de I. C. K. kaj de E. A. N. A. sinjoron Joseph R. Scherer, kies nomo dum 18 monatoj konstante aperis en “Heroldo,” nekalkulablaj oficialaj gazetoj kaj ankaŭ en A. E.

Dum sia mallonga restado en New York sinjoro Scherer renkontis multajn samideanojn, donis intervjuojn al gazet-raportistoj kaj disaŭdigis per la radio en Brooklyn. Bedaŭrinde estas ke pro lia mallonga tempo li ne povis resti ĝis Sabato, la 6a de Feb. por atendi la Novjorkan Bar. La 2an, merkrede, la sekretario de EANA invitus lin al la Centra Oficejo kaj aranĝis specialan festenon kune kun sia familio por honori la eminentan gaston. Sinjoro Scherer tie inter malgranda rondo faris paroladon pri sia vojaĝo kaj montris belan kolekton de siaj lumbildoj, kiun la tuta rondeto treege ĝuis.

Post tiu parolado sinjoro Scherer forveturis okcidenten.

Dum nur kelkhora restado en *Bufalo*, la 4an, kiel gasto de la gesinjoroj Parrish, li faris lumbildparoladon al la tieaj gesamideanoj.

En *Milwaukee* sinjoro Scherer paroladis dufoje. Sabaton, la 6an, al la City Club kaj Dimanĉon, la 7an, al la loka Ĉapitro. La gazetaro longe kaj tre favore raportis. Li ankaŭ faris oficialan viziton al la urbestro. Dum sia restado en Milwaukee li estis la gasto de la gesinjoroj Haman en Wawatosa, najbarurbo de Milwaukee. (Vidu specialan raporton.)

En *Chicago* okazis radioparolado kaj ankaŭ lumbildparolado organizita de nia loka Ĉapitro. Gesinjoroj Knapp gastigis nian vojaĝanton.

En *Kansas City, Mo.*, la frato de sinjoro Scherer sukcesis fari kontrakton por prelego ce la tiea Women's City Club. Tie nia mondvojaĝanto trovis la plej grandan aŭdantaron en Usono: pli ol 200 personojn. La postan tagon, la 12an, li faris duan paroladon al malpli granda grupo de private societo. (Vidu specialan raporton.)

Topeka, Kansas, estis vizitata de sinjoro Scherer Sabaton la 13an. Tie li estis salutata de nia

kunlaboranto Pastro Fazel kaj sinjoro Moorehouse. Okazis lumbildparolado al malgranda grupo de gesamideanoj. (Vidu specialan raporton)

Post privataj vizitoj en *Denver, Colorado*, kaj *Salt Lake City* ni retrovas nian samideanon en *San Francisco, Calif.*, kiel gasto de sinjoro Ames. Granda estis la ĝojo de revido inter la gasto kaj samideano, ĉar en San Francisco la mondvojaĝa fadeno ree tuŝis sin. Kiel oni scias estis de San Francisco ke sinjoro Scherer forlasis nian landon per la japan ŝipo Tatsu Maru en Septembro 1930. Kompreneble okazis parolado al la tieaj gesamideanoj.

Los Angeles. . . . Fine la Reveno! Dimanĉe la 21an de Februaro nia globtrotanto por la lasta fojo eltrajniĝis. En sia hejmurbo li estis salutata de 40 feliĉaj gesamideanoj.

La lasta parto de la mondfama vojaĝo okazis sub mirinda blua, kalifornia ĉielo,—unuflanke de la vagonaro “Lark” la blua Pacifika Oceano kaj sur la alia flanko herbejoj,—kaj ĉirkaŭe entuziasma grupo de esperantaj amikoj.

La Fina Resultato

La rezultato de tiu ĉi entrepreno estas impona kaj nova rekordo, ne nur en Esperantujo sed eĉ en la historio de mondvojaĝoj. Jen:

322 paroladoj en 18 monatoj en
41 diversaj landoj kaj insuloj en
6 diversaj lingvoj el tio
22 estis radioparoladoj.

La lingvo uzataj estis Esperanto, angla, germana, franca, itala, kaj svisgermana. El tio.

240 paroladoj estis en Esperanto aŭ 75% en la universala lingvo. Neniu, eĉ ne la Prezidanto de Usono povus atingi tian rekordon en 41 landoj SEN ESPERANTO.

Ni devas konsideri ke okazis longaj ŝipvojaĝoj kaj libertempoj en la tropika Palestino, Italujo, Svisujo ktp. Alimaniere la meza nombro estus—unu parolado en ĉiu tago—. Dum la lastaj 3 monatoj en Eŭropo li faris 50 paroladojn en ĉiu monato.

Estis tagoj kun 3-4 paroladoj antaŭ grandaj aŭdantaroj, kiuj variis ĝenerale inter 500 kaj 800, eĉ 1000 personoj; tre malofte malpli ol 200.

Por tion fari li devis uzi 25 diversajn ŝipojn, pli ol 300 vagonarojn. Sed ne sufiĉe! Dum tiu tempo li verkis centojn da gazetartikoloj kaj multajn konfidencajn raportojn al la Centra Oficejo



de I. C. K. Li ankaŭ faris 15000 fotojn kaj ĉion mem rivelis kaj mem preparis dumvoje 1000 novajn lumbildojn por prezentado dum la paroladoj. Li forveturis kun 3000 lumbildoj pri Usono kaj li revenis kun 4000 el la tuta mondo.

Kiu povus imiti tian diligentan laboradon, tian grandegan propagandon en stilo tiel granda, ke ni ĝis nun ankoraŭ ne vidis ion similan. Al kiu ni ŝuldas dankon por tiu ĉi finfina pruvo de la praktikeco de Esperanto? Al sinjoro Scherer? al I. C. K. kiu estis la aranĝanto de la vojaĝo? aŭ

al Esperanto, kiu estis la rimedo, la kaŭzo de ĉio ĉi?

Mi ne pensas ke la Mondo Esperantista devus admiri nur unu aŭ la alian: mi firml kredas ke la TUTA TRIO estas tia mirinda kombinacio ke nek mi nek iu alia povus nei sian admiron al la tuta institucio de la mondvojaĝo de

Sinjoro Joseph R. Scherer.

(Venu al Los Angeles, al la Kongreso kaj konvinku vin mem pri lia neelĉerpebla energio kaj la eleganta prezentado de liaj lumbildoj kaj paroladoj.)

J. J. SUSSMUTH.

Our Honor Roll

Donations

Rev. John H. Fazel	\$100.00
(Release of a loan made to EANA four years ago)	
Henry W. Hetzel	20.00
Fred H. McMann	1.00
Koran dankon!	

Atesto Pri Kapableco

Gilbert Nickel, Middletown, Del.

Edwin L. Clarke.

Bonvenon al Filio 17

Kun granda plezuro ni anoncas ke la Esperanto Klubo de Youngstown, Ohio, nun estas nia deksepa Filio. La nova klubo estas tre agema kaj baldaŭ aligos al ni multajn novajn membrojn. Sukceson al ili!

Niaj Mortintoj

Miss Amy C. Leavitt

We regret to report the death on February 5 of Miss Amy C. Leavitt, Vice-President of the Columbia Esperanto Association, and acting delegate of the Universal Esperanto Association. Miss Leavitt was one of the leading musicians of Washington City; she was a skilled linguist and an ardent Esperantist, having been one of the pioneers of the movement in the District of Columbia, and the founder of the present local body.

It will be hard to replace the inspiration and leadership which she brought to the Esperanto movement.

—ALAN DAVIS.



ORA MASKO
Bele bindita libro
75 cents
devas esti en ĉies
librejo

Esperanto Ass'n. of
North America,
Fort Lee, N. J.

Young People's Page

National Director: JOHN H. FAZEL : 1122 W. Eighth Street, Topeka, Kansas

UNU GRANDA KLASO

UNU granda klaso de Radio studentoj, en Osaka, Japanujo estis instruata de S-ro Ŝindo Seitaro, de tiu urbeĝo.

S-ro Seitaro en la jaro 1931 transiris Usonon, kaj vizitis nin, kaj faris paroladon al niaj gejunuloj en Topeka, kaj noktiĝis kun ni survoje. Li estas tre ĝentila viro, kaj tre sperta Esperantisto. Li skribas al mi ke li havis en lia Radio klaso 120,000 gestudentojn. Kial ni ne povas tiel fari ankaŭ, ĉi tie? Eble ni povas.

ANOTHER NEW GAME FOR YOU

HURRAH! People seem to like our Esperanto games. Young folks are making them, and playing them, so we hear; and at least one Editor has asked permission to copy the games and rules. That's o. k.

This game is for a class of beginners: Announce that at the next lesson a prize will be given to the one who uses the greatest number of Esperanto sentences without mistake, and another prize for the one who gives the best translation of those sentences. Also the same for giving words, and translations: This way—Chose up sides and sit opposite each other, like spelling school. As we have no spelling to learn after mastering the vowel sounds, we can spell down by words and sentences: Either side begins the fight by pronouncing clearly any word in Esperanto to the one on opposite side that one must give the English equivalent, or sit down. If he sits, the next has a try at it. If he gets it right, then he in turn tosses another word back in English which the other side must give the Esperanto word for, or sit out.

When the members of one side are all down, the other side scores as many points as they have members still standing. Then take it in sentences, the same way. When your time is up, or you are tired, the losing side must pay a forfeit of some kind, like apples for the whole klaso next time, etc.

Last fall we gave you five lines of "living Esperanto" showing the Present tense of the verbs. Now we give you five more lines of the same story continued, but which shows the Past tense of verbs—"IS."

Commit it to memory. Write it all out. Put it into English.

MI ELIRIS sur la strato. PluvIS. Mi nek havIS ombrelon, nek surtuton. SED mi renkontIS maljunan amikon. Li konIS min. Li invitIS min. MI dankIS lin, kaj saltIS en lian aŭto-n. Li demandIS, Qien vi volIS iri?

"IEN el la pluvo," mi dirIS al li. "Nu," li dirIS." Ni iru al la stacidomo." "BONE" mi respondIS, kaj li rapidirIS. La pluvo ĉesIS, la suno brilIS, kaj ni alvenIS.

Next time we take the future tense of verbs, for practice.



INFANMURDO

Tre interesa rakonto
broŝurita, 20 cents

Esperanto Ass'n. of North
America,
Fort Lee, N. J.

Writers!

If you need money or markets for your products, subscribe for "Creative World Magazine" and take advantage of our free Sales Promotion Service.

Sample Copy, 25 cents.

"CREATIVE WORLD MAGAZINE"

419 Union Insurance Building
LOS ANGELES, CALIF.

Please Write Us in Esperanto

Inventors!

MAPS

Have you world-wide interests?
Locate correspondents, travel routes,
Historical data or commercial plans on

Mondkarto Plata Egalarea

(All-world base maps 9 x 15 inches)
50 for \$1.00.

A 3-cent stamp 'll bring a sample.

N. W. FROST, BROWNFIELD, MAINE

Nia Biografio

(Daŭrigo de paĝo 96)

Li ĉeestis preskaŭ ĉiujn kongresojn de EANA kaj ankaŭ kelkajn universalajn. Dum siaj vojaĝoj en Eŭropo li nur uzis Esperanton kaj tiel denove havis okazon interesigi multajn personojn pri nia lingvo.

Dum la kongreso en Milwaukee en 1931 la kunveno petis lin verki "Kantaron" speciale por la Nord-Amerikaj Esperantistoj. Li akceptis tiun malfacilan komision kaj tuj verkis kanton por la kongreso, kiun ĉiuj ĉeestantoj kantis dum la kongresa festeno (vidu numeron 6 vol. 43).

Lia verko nun estas preta kaj la Esperanto Asocio de Nord-Ameriko baldaŭ eldonos lian "Amerika Esperanto Kantaro"-n. Kun tiu ĉi verko li konstruis monumenton por si mem kaj por la Esperantistoj de Nord-Ameriko, kaj la tuta mondo, verkon posedindan kaj admirindan.

Ni do esperas ke ni daŭre profitos per plua kunlaborado de nia "Poeto Laŭreato."

HAMANN'S GUIDE TO ESPERANTO

1. *A Short Unit Course in Esperanto*, intended for self-instruction and class use.
2. *An Esperanto Reader*, intended to guide the Esperantist in the study, teaching, use and promotion of Esperanto.

Mr. Edward S. Payson, Honorary President of E. A. N. A., writes:

"I consider Mr. Hamann's Guide to Esperanto a great work. The course shows great care and knowledge of the language. One knowing all there is in the course would know Esperanto."

PRICE—25 CENTS

Twenty copies or more—15 Cents Each

FRED A. HAMANN

481 63RD STREET, WAUWATOSA, WIS.

Foreign Esperanto News

(Daŭrigo de paĝo 93)

000 Esperanto textbooks were sold to radio listeners of the Esperanto-course, the fact that the Langenberg station sold 2,000 copies of the German-Esperanto textbook to its radio listeners in two weeks, does serve as added incentive to the American radio stations which broadcast Esperanto lessons.

Polland. The important medical journal, "Kwartalni Kliniczny," now publishes, at the end of every original article, a resume in Esperanto. This is an excellent example for other technical papers to follow and is a step forward to the time when all research papers will be published in Esperanto, and thereby be made available to the entire scientific world as compared to present limitations due to language.

Switzerland. The World Congress for Automobile Highways, which met in Geneva, gave its approval and support to a proposal to use Esperanto as the auxiliary language for traffic signals and signs to facilitate international travel of autoists.

MISS E. W. WEEMS has translated from the English the following books, well suited for easy prose reading to follow the first or beginners' books.

LA TASO DE AMSERVO

(The Cup of Loving Service), by

Eliza Dean Taylor 35c

MALLONGA BIOGRAFIO

DE HENRY FAWCETT,

by Winifred Holt 25c

For sale by Esperanto Association of North America, Fort Lee, N. J.

or Miss E. W. WEEMS, 516 N. Charles Street, Baltimore, Md.

Esperanto-Domo

Ĉu Vi Deziras Loĝi Tie Iafaĵe?

La Esperanto-domo ĉe Arnhem, Holando kaj Aspremont, Francujo ja plenumas longedaŭran bezonon; kaj kompreneble aliaj 'domoj' rapide ekestos. Tia estas proponita por Greenacre, Maine (apud Portsmouth, New Hampshire), kie someras la Bahaanoj kaj havas sian jaran kunvenon. Trafa estas Greenacre por la unua Esperanto-Domo de Usono, ĉar la Bahanoj estas tre amikaj al la internacia lingvo, kaj ke ili lernu ĝin estas unu el la krederoj de Bahaisco. Lastatempe, en Bostono, kelkaj Bahaanoj komencis la studadon de la lingvo kaj sendube ili multe ĝojos se ni sami-

deanoj helpos al la starigo de domo en kiu Esperanto estas la sola lingvo. Ni ĉiuj konas la fakton ke 'lingva atmosfero' estas nepre la granda rimedo por ellerni ian lingvon, se oni deziras paroli ĝin. Tial, ĉiu samideano kiu opinias ke li vizites tian domon dum julio aŭ aŭgusto, ĉu dum semajno aŭ plu, ĉu eĉ dum unu tago aŭ nur dum cnu horo, bonvole skribu al "Esperanto Informo," 50 Congress Street, Boston, Mass., kiel eble plej baldaŭ, por ke oni havu ideon pri la kredebla ĉeestantaro. Se la entrepreno sukceses dum la somero, sendube sekvos tia domo tra-la-jara en iu urbo, eble kelkaj, nialande.

Concord, Mass.

GEO. W. LEE.

SCIENCA GAZETO

Esperanta

Nova popularscienca gazeto kun la supra nomo estas eldonata tute en Esperanto kun sekvanta celo:

1. Utiligi Esperanton por disvastigi popularan sciencan en la tuta mondo.
2. Krei kampon kaj rimedon por utiligi Esperanton por praktikaj celoj, tiel nerekte propagandante Esperanton.

3. Kunligi ĉiujn esperantistojn kiuj interesigas pri sciencaj temoj.

La unua numero jam aperis kaj ĝi enhavas multajn interesajn artikolojn. La gazeto estas en la komenco dumonata kun la promeso ĉiumonatigi ĝin kiel eble plej baldaŭ, sen plialtigo de la abonprezo.

Jara abono unu dolaro usona.

Popularsciencaj artikoloj estas bonvenataj.

Sendu abonpagojn, artikolojn, kaj komunikadojn al

AMERIKA ESPERANTO - INSTITUTO

124 KING STREET

MADISON - WISCONSIN - U. S. A.



- The knowledge of Esperanto that we have gained through the printing of Amerika Esperantisto, coupled with our ever-present desire to make every printed piece look as fine as possible, makes us the logical source of supply for all Esperanto printing in America.

Let us quote on your office or publication requirements.

THE WOOD PRESS, Inc.

Paterson, New Jersey

Club Directory—Cont'd

Chapter No. 14. Chicago Area Esperanto Society. 2408 Warren Blvd., Chicago, Ill. Pres., Dr. George J. Drews; Sec'y, Alois S. Knapp; Treas., Arthur E. Regal. Meet every Wednesday at 8 p. m., at above address.

Chapter 15. Detroit Esperanto Society, 2916 E. Grand Blvd., Detroit, Mich. Pres., Dr. Tobias Sigel; Sec'y-Treas., Miss Elizabeth Stauffer.

Chapter 16. Esperanto Club of Long Beach, Calif. Mrs. Hallie Nye, Pres.; Dr. Annie M. Broadhead, 1st V. Pres.; Miss Mazah Schulz, 2nd V. Pres.; Grover C. Gates, 3rd V. Pres.; Mrs. Florence Hackett, Sec., 360 Gladys Ave.; Mrs. C. W. Tracy, Treas. Meets at 1433 E. 9th St., the second Thursday of each month. Class at Polytechnic High School. Broadcasting over Station K F O X, 1250 kc.

Chapter 17. Youngstown Esperanto Society, Youngstown, Ohio. George J. Jeffries, Pres.; E. N. Parsons, Sec., 54 S. Prospect Street; K. C. Kerr, instructor. Class meets at Public Library every Friday at 7:30 p. m.

Arlington, Mass. Arlington Esperanto Group. Meets every other Wednesday at 8:30 p. m. at 60 Oxford Street. Mrs. Esther T. Malouf, Sec'y.

Baltimore, Md. La Esperanta Rondeto. Hy S. Randall, Sek., 705 Winston Ave.

Boston, Mass. Boston Esperanto Informo. Miss E. J. Meriam, 50 Congress St.

Buffalo, N. Y. "Esperanto Klubo Niagara" meets on alternate Tuesdays in the Document Room of Grosvenor Library at 8 p. m. Mr. Fred Weiss, Sec'y, 568 Stockbridge Street.

Charles City, Iowa. Charles City Esperanto Club, Ellis Bldg. Dr. W. H. Seymour, Pres.; Mrs. Clarence Budensiek, Sec'y; Rev. Budensiek, Treas.

Chicago, Ill. La Gradata Esperanto Societo N-ro. 1, 1500 W. Cullerton St., Chicago, Ill. Pres., Mr. J. B. Rezny; Sec'y, Mr. V. Popela; Treas., Dr. Leo G. Simonek. Meets fourth Friday of every month at 8 p. m.

Chicago, Ill. La Gradata Esperanto Societo N-ro 2a. Meets every second Wednesday at Maxwell's Vegetarian Restaurant, 35 E. Van Buren St. Sec'y, Mrs. Hannah Maxwell.

Cleveland, O. Cleveland Esperanto Society, 2735 Prospect Ave., Cleveland, O. Pres., James J. Fox; Sec'y and Treas., Mr. H. M. Duff. Meets first Thursday of the month at Public Library.

Detroit, Mich. Pola Esperanto Associo. Mr. B. Lendo, Sec'y, 3596 29th St.

Duluth, Minn. Duluth Esperanto Club. Pres., Mr. E. Bauer, Arlington Heights, Duluth; Sec'y, Mr. H. Merry.

Grande Prairie Esperanto Club, Grande Prairie, Alta, Canada. P. O. Box 1693. Details outstanding.

Houston, Texas. Houston Esperanto Club. K. H. Adams, Pres.; C. M. Sanders, Sec.-Treas., 4825 Jackson Street. Other details outstanding.

Jersey City, N. J. Universal Esperanto Fraternity, Inc., 574 Jersey Avenue. President, John Bovit, 128 Market Street, Newark, N. J.; Secretary, Mrs. H. Tylick, 384 Baldwin Avenue, Jersey City, N. J. Business meetings on second Thursday of every month. Children's class meets Saturday evenings from 6 to 7:30, followed by tea, a club meeting and a social hour until 10. Warren Gould and Camille Katchko, instructors. Publishes quarterly "Esperanto-Lando."

Lithopolis, O. The Wagnalls Memorial Esperanto Society. Children's classes each Saturday afternoon. Adult classes each Tuesday evening.

Milwaukee, Wis. Bahai Auxiliary Esperanto Group. Meets every Tuesday, 8:00 to 10:00 p. m., at 1124 N. 12th St.

New York City, N. Y. Bahai Centre. Meets

every second and fourth Saturday evenings at 119 W. 57th St.

New York, N. Y. SAT-Rondo Nov-Jorka. Kunvenas la lastan vendredon de la monato ĉe 108 East 14th Street, je la 1a Sa horo. Antaŭsidanto, Ben Odinov; Protokol Sekretario, G. J. Kroes; Korespond-sekretariino, Herta Carstens; Kasistino, Bertha Israel; SAT-peranto, Ervin Dann; Bibliotekisto, Josef Lehn. Informon petu de Ben Odinov, 1930 73rd Street, Brooklyn, N. Y.

New York, N. Y. Grupo de Sennaciistoj, 24-29 Merchant St., Astoria, L. I., N. Y. Sekretario, T. Veder. Loka Branĉo de tutmonda organizo. Eldonas ĉiumonatan interesan bultenon "Ĉirkaŭ la Globo." Informojn petu ĉe supra adreso.

Peoria, Ill. Organizer, A. S. Mellichamp, 119 Butler St. Classes conducted by A. S. Mellichamp and Norman McQuown.

Philadelphia, Pa. Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Portland, Ore. Portland Esperanto Club, Mrs. L. Caswell, Pres.; Mr. H. Denlinger, Vice-pres.; Mr. Gleason, Sec'y-Treas.; 791 Overton St., Portland, Ore. (Details outstanding.)

San Francisco, Calif. The Esperanto Ass'n of California, 309-11 DeYoung Bldg., San Francisco, Calif. Sec'y, R. Hill. No regular meetings.

St. Petersburg, Fla. Sunbrila Rondo, 127 1st Ave., St. Petersburg, Fla. Pres., Roy S. Hanna. Meets at Princess Martha Hotel, Wednesday, at 3 p. m.

Topeka, Kans. Topeka Esperanto Association, 1122 W. 8th St., Topeka, Kans. Pres., Captain Geo. P. Morehouse; Sec'y and Treas., Mrs. Lida R. Hardy. Meets first Thursday of the month at 1122 W. 8th St. Two advanced and Beginners' classes.

Toronto, Canada. Toronto Esperanto Klubo, Peacock Inn, 99 Yonge St., Toronto. Pres., Elvin J. Bengough; Sec'y and Treas., Harry Wall. Meets 6:30 p. m. at Peacock Inn.

Worcester, Mass. Worcester County Esperanto Society. Meets at call of Council, at R. 17 P. O. Dr. Gustave Desy, Pres., Box 450, Millbury, Mass.; Odiorne Gleason, Sec'y and Treas., R. 17 P. O.

TUJ VI DEVAS MENDI
PROVEKZEMPLERON
DE
LITERATURA MONDO
LA PLEJ BELA GAZETO
EN ESPERANTO,
FOR 20 CENDOJ

Ĉefredaktoroj Kolomano Kalocsay
kaj Julio Baghy

Kunlaborantoj la plej famaj esperantistaj
verkistoj kaj tradukistoj.

Reprezentanto por Usono:
Amerika Esperanto Institute
Sherlock Hotel, Madison, Wisconsin
Usono

ESPERANTISTS EUROPE-BOUND

WITH

JAMES D. SAYERS

AND IN CO-OPERATION OF


UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION

Sailing — July 1st - - - S.S. OLYMPIC

Returning — August 6th - - - S.S. MAJESTIC

FARE — \$680.00

(Reduced Fare for Restricted Third Class or Former Tourist)



Geneva Lake, Geneva, Switzerland

A unique opportunity to enjoy a carefully planned general tour of Europe, visiting the great cities of the Old World, along the most picturesque route of European travel, meeting leading Esperantists and attending the Esperanto World Congress in Paris. Instruction in Esperanto before sailing and during the Tour.

Write for Booklet — Register Now for This Delightful Summer of Travel



Trafalgar Square, London, England

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA
FORT LEE, NEW JERSEY

OR

THE AMERICAN INSTITUTE OF EDUCATIONAL TRAVEL
587 FIFTH AVENUE, NEW YORK, N. Y.

(Mention this Magazine)